



5

BULGARA ESPERANTISTO

ORGANO DE BULGARA
ESPERANTISTA ASOCIO

M A J O 1963

E N H A V O

	Pago
* * La Patrolanda Fronto kaj la aktiveco de la esperantistoj	1
* * 48-a Universala Kongreso de Esperanto	2
* * 19-a Kongreso de TEJO	4
Cirkulero de CK de Komsomolo	4
Penko Stoev. La revo efektivigas	6
Dimităr Kalčev. Al novaj sukcesoj de la Esperanta Koope-	
rativo	7
Atanas D. Atanasov — Ada. Leciono de Esperanto	8
Krum Grigorov. La portreto	10
Nikola Pilev. Amo	12
Tibor Seke j. La plej granda urbo de Afriko	13
Tra la gazetaro	14
Organiza vivo	15

Lasta dato por aliĝo al 48-a Universala Kongreso de Esperanto flanke de la bulgaraj esperantistoj estas la 20-a de junio. Post tiu dato oni ne akceptos plu aliĝilojn.

Abonkotizo: jara — 1,4 levoj, duonjara — 0,7 lv. Por eksterlando — 2lv 2 rubloj, 2 dolaroj aŭ egalvaloro; por Albanio, ĈSSR, Hungario, Jugoslavio, Pollando kaj Rumanio — 1,6 lv.

Reklamtarifo: 0,15 levoj por cm²; korespondanoncoj: 5 stotinkoj por ĉiu vorto. Eksterlandaj adresoj publikigataj senpage. Ekstera kovrilpaĝo — 60 lv.

LANDAJ PERANTOJ DE „BULGARA ESPERANTISTO“

ALBANIO: Inĝ. Cefo Fico, 44 Rruga Stafa, Tirane.

ITALIO: Julia Franceschi, via A. Boito 6, Padova

KOREO: Korea Esp. Asocio. Pjeng' jang P. O. kesto 16.

NEDERLANDO: Ru Bossong, Floraplein 23 Eindhoven.

RUMANIO: Mihail Popescu, Cal. 13 Septembrie 65, București 5

SOVETUNIO: Ivan Palkin, Mitnaja ul 52/54 kv. 19, Moskva, B—162

SVEDIO: Karl Kvist, Deje, Box 109—a.



LA PATROLANDA FRONTO KAJ LA AKTIVECO DE LA ESPERANTISTOJ

La Patrolanda Fronto estas la plej vasta popola demokrateca organizaĵo en nia lando. Ĝi unuigas en siajn vicojn milionojn da bulgaraj civitanoj. La Patrolanda Fronto estas amasa skolo por edukado de la loĝantaro en la spirito de la socialisma patriotismo kaj proleta internaciismo, por ĝia unuigo, por la plenumo de la grandioza programo ellaborita de la Oka Kongreso de Bulgara Komunista Partio.

La bulgaraj esperantistoj estas ankaŭ nedeŝirebla ero de la Patrolanda Fronto, aktivaj batalantoj por realigo de ĝiaj altaj celoj — la finkonstruo de la socialismo kaj la transiro al la laŭetapa konstruado de la komunisma socio, por la ĉiufanka kaj ekonomia disvolviĝo de nia lando kaj popolo.

La popola registaro kreas favorajn kondiĉojn por la laboro kaj la agado de la esperantistoj kaj ties asocio kaj kunhelpas ilin morale kaj materiale. Dank' al tio kaj al la sindona laboro de la lokaj societoj kaj de ĉiuj bulgaraj esperantistoj la internacia lingvo ĝuas vastan rekonon kaj simpatian ne nur de la aŭtoritatoj, sed ankaŭ de nia tuta popolo. Esperanto fariĝis tre populara en Bulgario kaj la movado senĉese kreskas kaj plifortiĝas. Al la movado aliĝas novaj freŝaj kaj energiaj fortoj, plialtiĝas la lingva nivelo de la malnovaj esperantistoj. Sendube ĉio ĉi devigas la esperantistojn kaj la estrarojn de la lokaj societoj en la tuta lando kunligi pli intime kun la lokaj organizaĵoj de la Patrolanda Fronto — distriktaĵ, urbaj, vilaĝaj kaj kvartalaj kaj partopreni organizite por la plenumo de la planitaĵ de ili entreprenoj, ne nur sur la kultura, sed ankaŭ sur la ekonomia kampo. Bonan ekzemplon tiurilate donas al ni la E-societoj en la urboj Jambol, Stanke Dimitrov, Stara Zagora, Plovdiv, Ruse, Pleven kaj en la vilaĝoj Borima, Polski Trambes kaj multaj aliaj. Tamen estas ankaŭ societoj, kiuj neglektas tiun tre utilan kunlaboron. Estante oni ne devas allasi tion.

La societoj kunlaborante al la organizaĵoj de la Patrolanda Fronto ricevis mem utilon kaj helpon por sia kulturkleriga propaganda kaj organiza Esperanto-agado. Sur la kultura kampo oni povas kunlabori en tre gravaj kaj rezultodonaj aranĝoj: organizo de komunaj vesperfestoj (precipe en la vilaĝoj), prelegoj, Esperanto-kursoj. Oni povas utiligi por ili la klubojn de la lokaj organizaĵoj de la Patrolanda Fronto. Tie, kie la Esperanto-societoj ne havas proprajn klubojn oni povas post reciproka interkonsento akiri la rajton uzi iujn iliajn klubojn por la organiza vivo. La distrikta komitato de la Patrolanda Fronto en Tolbuhin rekomendis al ĉiuj siaj organizaĵoj krei Esperanto-rondojn. Estas ankaŭ aliaj entreprenoj, kiujn oni povas efektivigi laŭ la lokaj kondiĉoj. Tiu ĉi kunlaboro helpas al la societoj plibonigi sian agadon, disvastigi la internacian lingvon kaj ties praktikan aplikon inter la popolo.



S O F I O 3-10 VIII 1963

PLEJ GRANDA

POSTMILITA

KONGRESO

Loĝado en Sofio. La Loĝiga Servo de la Kongreso certigas por ĉiu mendinto loĝadon dum la kongresa semajno. Ĝi tamen ne povas certigi la plenumon de la deziroj de la malfruaj mendintoj. Pro tio estas konsilinde sendi kiel eble plej baldaŭ la koncernan mendilon por loĝado.

Mendoj, kiuj alvenos post la 10-a de julio, ne estos akceptitaj.

I. S. U. La Estraro de U. E. A. decidis ke la prelegoj de la Internacia Somera Universitato estu la jenaj:

- a) D-ro Victor Sadler: „Ĉu kulturoj aŭ kulturo?“
- b) Prof. Gaston Waringhien: „La ellaborado de Esperanta leksikologio“.
- c) Prof. Petr Dinekov: „Evoluo de la bulgara literaturo“.
- ĉ) F-ino Mag. Marjorie Boulton: „Metaforoj, kliŝoj kaj slango“.
- d) Prof. Stojan Djoudjeff: „La muziko de la lingvo“.
- e) S-ro Josip Vrančić: „Mezepokaj murpentraĵoj de Serbio kaj Makedonio kaj ilia signifo en eŭropa arthistorio“.
- f) D-ro Tadeusz Wójcik: „La racia muzikskribo“.
- g) S-ro Boris Kolker: „Rezultoj de permaŝina tradukado el la rusa lingvo en Esperanton“.

Karavano. Anoncis karavanon la Kongresvojaĝa sekcio de C. D. E. L. Lovetandsvej 31, Kobenhavn, Brh.

Aliĝoj. Ĝis la 20-a de majo aliĝis al la kongreso 2734 el 39 landoj.

МИНИСТЕРСТВО НА ПРОСВЕТАТА MINISTERIO DE LA KLERIGO
У-НИЕ ОБЩО ОБРАЗОВАНИЕ

№ УМ-2011

6. III. 1963 г. София

До есперантския съюз
ул. Дондуков 57
ТУК

Al la Esperantista Asocio
Sofio

Съобщаваме Ви, че са одобрени от другаря Министър следните мероприятия:

1. Да се популяризира конгреса чрез в. „Учителско дело“, като преди и по време на конгреса се публикуват подходящи статии и съобщения.

2. Да се уреди посещение на Двореца на пионерите, техническата станция на младите техници, едно

Ni sciigas al vi, ke estas aprobitaj de kamarado Ministro la jenaj entreprenoj:

1. Oni popularigu la kongreson per la gazeto „Uĉitelsko Delo“ („Instruista Afero“), publikigante antaŭ kaj dum la kongreso konvenajn artikolojn kaj sciigojn.

2. Oni aranĝu viziton al la Palaco de la Junpioniroj, la teknika stacio de la junaj teknikistoj, iu unuagrada kaj



основно и едно средно политехническо училище и техникум.

3. Да се нареди на градския отдел „Просвета“ да задържи организираните годишни изложби до средата на месец август, тъй като организирането на специална изложба изисква много средства, а такива няма предвидени.

4. Съюзът на учителите да уреди безплатна екскурзия на делегатите учители и научни работници до Боровец и Рилския манастир.

5. Заседанията и свободните занимания на детския есперантски конгрес да се провеждат в Двореца на пионерите, тъй като там има всички условия за изпълнение на представената от международния комитет програма.

6. Да се предоставят изцяло детските домове „Млада гвардия“ и „Наше огнище“ за квартира на децата, делегати на конгреса.

7. От новата учебна година да се даде указание за организиране на кръжоци за изучаване на есперанто в средните политехнически училища и техникумите по представена от Съюза на есперантистите програма.

8. Да се уреди среща от Министерството със 150 делегати учители—есперантисти за запознаване с нашата образователна система.

НАЧАЛНИК УПРАВЛЕНИЕ:
(п.) Ил. Тачев

iu mezgrada politeknika kaj faka lernejoj.

3. Oni ordonu al la urba fako „Klerigo“ deteni la organizitajn jarajn ekspoziciojn ĝis la mezo de monato aŭgusto, ĉar la organizo de speciala ekspozicio postulas multe da monrimejoj kaj tiaj ne estas antaŭviditaj.

4. La asocio de la instruistoj aranĝu senpagan ekskurson de la delegitoj-instruistoj kaj scienclaboristoj al Bóroves kaj Rila-monaĥejo.

5. La kunsidojn kaj la liberajn aranĝojn de la Infana Esperanto. Kongreseto oni okazigu en la Palaco de la Junpioniroj, ĉar tie estas ĉiuj kondiĉoj por la plenumo de la prezentita de la Universala Esperanto-Asocio programo.

6. Oni disponigu entute la infanajn domojn „Mlada Gvardija“ kaj „Naŝe Ogniste“ por loĝigo de la infanoj, delegitoj de la kongreso.

7. Ekde la nova lernjaro oni donu instrukcion por la organizo de studondoj por lernado de Esperanto en la mezgradaj lernejoj laŭ la prezentita de la Bulgara Esperantista Asocio programo.

8. Oni aranĝu renkonton de la Ministerio kun 150 delegitoj—instruistoj-esperantistoj por konatigo de nia kleriga sistemo.

Departementestro:
(s.) Il. Taĉev

NOVAJ SOCIETOJ

CK de BEA konfirmis la jenajn novajn societojn:

134. Nikopol — „P. Simeonov“.

135. Plovdiv — „Studenta Impeto“.

136. Sviŝtov — ĉe Supera Financa Ekonomia Instituto.

137. Vilaĝo Zelenikovo (Plovdiva distr.) — „Kolombo de la paco“.

138. Vilaĝo Proslav (Plovdiva distr.)

139. Ruse — „Danuba Studento“.

AL VRACA



TUJ ALIĜU!

K-do GANĈO GANEV — Ministro pri klerigo akceptis esti Honora Protektanto de la kongreso.

La kongresajn kulturajn programojn partoprenos interalie: vira okteto el Ljubljana, skota kantgrupo el Glasgovo, du japanoj — plenumontoj de tipa japana fluto-ludado kaj la konata esperantista kabaredo „Verda Simio“ el Varsovio.

En Vraca jam funkcias kelkaj kursoj de Esperanto por restoraciaj kelneroĵ, vendistinoj kaj sanitaristoj. Antaŭstaras la malfermo ankaŭ de aliaj kursoj.

En preparo estas „Angulo de ekstereŭropa kulturo“, kiu devas kontribui al la kongresa etoso kaj garantiĝi ĝian plenan universalecon ankaŭ ĉe la foresto de reprezentantoj de foraj landoj. Samideanoj, kiuj pretas kontribui per taŭga materialo — fotoj, libroj, objektoj de la nacia arto, diapozitivaj, sonbendoj, informoj pri la kultura vivo en la landoj de Afriko, Azio, Ameriko kaj Aŭstralio estas petataj tuj kontakti la kongresan komitaton.

La Kongresan Komitaton atingis pluraj demandoj pri la unuaj oficialaj Esperanto-sportludoj. Ĉu vi jam decidigis partopreni? Skribu al ni en kiu disciplino ni devas enlistigi vin!

La unuajn premiojn de la Kongresa Komitato gajnas: Nikola Pilev el Varna, kongresa № 50; Beate Neumann el GDR № 100; Juli Penkov el Sofio № 150; Polarczyk Wacław el Katowice (Pollando), № 200.

Statistiko: Ĝis la 15. V. 1963 aliĝis 335 gejunuloj el 18 landoj. Anoncis sin ankaŭ 16-membra turista karavano el Leningrad, Sovetunio.

ДИМИТРОВСКИ КОМУНИСТИЧЕСКИ МЛАДЕЖКИ СЪЮЗ

Централен комитет

УКАЗАНИЕ

за откриване на курсове по есперанто

От 27 јули до 3 август 1963 година в град Враца ще се състои 19-тият Световен младежки есперантски конгрес. В китния град Враца ще дойдат младежи-есперантисти от цял свят. Те ще посетят индустриални предприятия, кооперативни стопанства, природни красоти, туристически обекти. Нашите младежи ще разкажат на гостите своите успехи в социалистиче-

ското строителство. Взаимното опознаване и разбирање може да се осъществи най-леко чрез есперанто. Така ще се завържат ценни и трайни приятелски врѝзки.

България постигна големи успехи в социалистическото преустройство на народното стопанство, в областта на образованието, здравеопазването, изкуството и спорта. Тези успехи ние трябва да направим достояние на всички честни младежи и девојки по света, на всички борци за мир и и дружба меѓу народите.

Големи възможности за кореспондирање с чужбина дава меѓународниот език есперанто. Опростената граматика на този език дава възможност на всеки любознателен младеж и девојка да го изучи за кратко време и да го използва за своите меѓународни врѝзки.

Курсовете за изучавање на есперанто се откриват и ръководят от Български есперантски сѝюз чрез есперантските дружества в страната.

Комсомолските организации в предприятията и учрежденията, учебните заведения (начални, средни и висши) да подпомогнат местните есперантски дружества, да се вклучат повеќе младежи и девојки в курсовете, да сѝдействуват за осигурување на учебни стаи и помагала.

При откривањето на курсовете треба да се има предвид следното:

1. Учебните групи да не са по-големи от 30 души.

2. В една и сѝща група да се вклучват курсисти с приближително еднаква образователна подготовка, с еднакво работно време, а не учесниците от различни работни смени.

3. Всеки курсист заплаќа такса за курс 6 лв. за работници и служители, 3 лв. за ученици, студенти и војници. Сумите се внасят в местното есперантско дружество.

Откривањето на курсовете започва след набирање на потребниот минимален број курсисти. На откривањето е желателно да се поканят представители на местното есперантско дружество.

Времетраењето на курса, бројот на седмичните занимања, продолжителноста на лекциите и други подробности се определет на място, според възможностите и условията.

Централен комитет на Български есперантски сѝюз

Секретар: (п) В. Олянов

Централен комитет на ДКМС

Секретар: (п) Ст. Димитров

La Junulara Jaro

... en nia ando

En Karlovo la kampanjo estis solene inaŭgurita per speciala kunveno en la societa klubejo. Parolis k-do Cv. Cvetkov — CK-ano de BEA. Kiel ekzemp'ono de modela agado li montris la iaman lernantan societon en la urbo „Ni venkos!“ — antaŭulo de la nuna societo „V. Levski“. Li substrekiis, ke la nuna aktiva partopreno de la junularo en nia movado sendube alportos al ĝi valorajn atingojn. La ĉeestantaj pli ol 30 junuloj kaj reprezentantoj de la lernantaj grupoj elektis novan estraron kun prezidanto V. Donkova kaj sekretario P. Ajlakov kaj akceptis planon por la kampanjo dum 1963.

En la lasta tempo la konata pioniro de la Esperanto-movado Radoslav Tričkov el Vraca prelegis publike antaŭ centoj da lernantoj en kelkaj urboj pri la internacia lingvo kaj la antaŭstarantaj Esperanto-kongresoj en Vraca kaj Sofio. Ĉiam kun granda sukceso li prelegis en Târgoviște, Kneja, Mihajlovgrad k. a. En la gimnazio en Mezdra antaŭ nelonge okazis lia 23-a prelego. Koran dankon al k-do Tričkov pro lia valora kontribuo per propagando en lernantaj medioj.

La junulara grupo en Kubrat aktivas. Ĝi jam aligis dekunu el siaj membroj al la kongreso en Vraca. Dum aprilo oni organizis la jarkunvenon kaj oni elektis novan estraron de la grupo kun prez. I. Marinov kaj sekr. J. Djulgerova. Oni planis vastan kulturen agadon kaj specialan radiodisaŭdigon pri la Junulara Jaro kaj la TEJO-kongreso. La junuloj el Kubrat partoprenos ankaŭ la balon-festivalon en Varna.

La plej juna kaj plej multnombra junulara grupo en Miĥajlovgrad en sia unua jarkunveno pridiskutis sian agadon kaj siajn planojn por la estonto. Zorgoplene la junuloj proponis rimedojn por plialtigo de la lingva nivelo.

... en la mondo

En la januara numero de la revuo "Esperanto" per konvenaj artikoloj estis oficiale anoncita kaj inaŭgurita la **Jaro de la Junularo**.

Inter la plej gravaj projektoj de la Jaro de la Junularo estas la starigo de **junulara gazeto**, kiu estu samtempe la oficiala organo de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo kaj internacia kunligilo inter la junaj geesperantistoj, verve kaj interesa revuo por la tuta esperantista junularo.

La juna numero de revuo „Esperanto” — organo de UEA ankaŭ estos dediĉita speciale al la problemoj de la junularo en la Esperanto-movado.

En preparo estas speciala broŝuro pri TEJO kaj ĝiaj landaj sekcioj, enhavanta interesajn informojn pri la strukturo, aktivecoj kaj atingoj de TEJO, pri ĝiaj gvidorganoj kaj landaj sekcioj.

Niaj veteranoj rakontas

LA REVO EFEKTIVIĜAS

Dum aŭgusto 1911 j., irinte Antverpenon (Belgujo) por partopreni 7-an Universalan Esperanto-Kongreson, mi haitis en Sofio, kie mi anoncis al tiama estraranoj de Bulgara Esperantista Ligo (Georgo Aktargiev kaj Petro Jordanov) mian intencon. Ili utiligis okazon kaj havigis al mi rajtigilon por reprezenti en la kongreso Bulgaran Esperantistan Ligon. Tion mi plenumis. Tie min prezentis al D-ro Zamenhof la konata profesoro Karlo Burlet. Nian Majstron mi salutis en la nomo de la bulgaraj esperantistoj.

En la raporto pri la kongreso, kiu estas presita en la tiama revuo „**Lingvo Internacia**“ (Parizo) 1911 j., kajero 8—9, oni legas inter gravaj kongresaj okazintaĵoj kaj jenon: „S-ro Stojeff (Bulgario) ĉiam deziris ĉeesti kongreson de Esperanto, kaj nur tiun-ĉi jaron sukcesis kontentigi sian ĉiaman esperon. Li, do, estas tre ĝoja kaj fiera, ke oni lin rajtigis kiel delegiton, kaj deziras, ke iam la kongreso okazu en Sofio“.

Nun mi — 83 jaraĝa — ĝojas ne, sed ĝojegas, ke finfine, post 52 ja-

roj, efektiviĝos mia deziro: 48-a Universal Esperanto-Kongreso tiun-ĉi jaron okazigos en Sofio!

Dezirinde, ke mi ĝisvivu partopreni ĝin!

Penko Stoev
Plovdiv

ANKAŬ TIO OKAZAS SUB LA ĈIELO

CENTRO TRADUZIONI E SERVIZI DI CONGRESSO — Laŭdire la plej kompleta eŭropa organizaĵo por interpretado kaj teknika priservo de internaciaj kongresoj, serioze! proponis al la Kongresa Komitato de la 19-a Internacia Junulara Esperanto-Kongreso en Vraca organizi per siaj teknikaj rimedoj kaj siaj spertaj interpretistoj la samtempan interpretadon en kelkaj lingvoj por tiel „helpi“ la kongresan laboron. Ni rapidas diskonigi tiun „trafan“ proponon ĉar eventuale ankaŭ aliaj Esperanto-kongresoj ŝatus profiti la helpemon de la afabla organizaĵo. Estus bedaŭrinde, se ili ne antaŭvidis en siaj buĝetoj sumojn por teknika interpretado.



НОВИ УСПЕХИ НА ЕСПЕРАНТСКАТА КООПЕРАЦИЯ

Задачите на Българската есперантска кооперация и изискванията към нея, при условие на активизиране и масовизиране на есперантското движение в нашата страна, решително нарастнаха и се повишиха. Естествено е, че нейното ръководство трябваше да направи преоценка на работата си и да я насочи и издигне на нивото на изискванията при новите условия, ва да може тя да бъде пълноценна материална база на нашето есперантско дело. Липсата на колективност в ръководството на кооперацията доведе до редица слабости и грешки, до стопански нарушения и откъсване от есперантското движение и неговия ръководящ орган.

Проведеното годишно отчетно-изборно събрание на Българската есперантска кооперация на 3 март т. г. почти единодушно обнови управителния съвет с авторитетни активисти на есперантското движение. Новият управителен съвет незабавно започна напрегната организаторска работа за рязко подобряване и целенасочване дейността на кооперацията.

Основното и най-важно условие, което гарантира нашите бъдещи успехи в посрещане нарастващите нужди на есперантското движение, е нашето единомислие при обсъждане и решаване на главните и текущи въпроси и задачи. Първа задача е възстановяване доверието към кооперацията и съгласуваността с ЦК на БЕС. Осъществява се абсолютна координация по есперантската дейност на кооперацията.

Нашите основни и непосредствени задачи, успешното решаване на които ние не виждаме без участието и подкрепата на всички есперантски дружества, на всички есперантисти, се очертават в няколко направления.

На първо място — осигуряването на достатъчни количества учебна и спомагателна есперантска литература и пособия за изучаване и усъвършенстване на езика. Заедно с това създаване на действена мрежа от организатори и разпространители на тези издания, за да могат те да стигнат и до последния начинаещ или напреднал есперантист в най-затътените селища на родината ни. В този сектор на нашата дейност е и осигуряването на достатъчно заглавия от хубава и съдържателна есперантска литература от чуждестранните издателства.

Не по-малка задача е и организирането и издръжката на летните учебни есперантски лагери; на първо време довършване лагера в Дружево, като се осигурят сносни битови условия и добра методическа работа на курсовете; подготовка на нови лагери по Черноморието.

С не малко чувство на отговорност и задължение е поета и задачата за представяне на 48-я световен есперантски конгрес. Съгласуваните с ЦК на БЕС и Ло-Ко-Ко мероприятия ще представят достойно нашето есперантско движение и нашата родина пред гостите от цял свят.

Разбира се в нашата работа има и не малко трудности, както от обективен така и от субективен характер, които ние трябва да преодолеем. Налага се на първо място масовизиране на кооперацията, което ние се надяваме, че ще успеем да осъществим с помощта на есперантските дружества.

Новият управителен съвет е уверен, че при наличието на абсолютната съгласуваност и подкрепа на ЦК на БЕС, ще има подкрепата на цялата национална есперантска организация по-нататъшното разгръщане на нашите полезни инициативи, за всестранно процъфтяване на език на мира — есперанто.

Димитър Калчев
председател на БЕК

Deksepa leciono

MIAJ KORESPONDANTOJ

Mi ricevis respondojn al miaj leteroj ankaŭ el Brazilo kaj Aŭstralio. Poste mi komencis korespondi kun du samideaninoj — unu el Japanujo, alia el Sudafriko.

Imagu, kiel feliĉa mi sentis min! Jam mi havas rilatojn kun geesperantistoj el kvin landoj en la kvin kontinentoj.

Ĉiutage mi malfermas senpacience la leterujon por vidi, ĉu venis nova letero el la vasta Esperantujo.

Ni sciigis reciproke la adresojn de la ceteraj gekorespondantoj kaj baldaŭ ni ĉiuj interligis nin en unu koresponda amika rondo. Komence ĉiu korespondis individue kun ĉiu aparta membro de la rondo. En unu momento al la brazila samideano Rodrigues venis la ideo skribi komunan leteron al ĉiuj, sendante kopiojn de ĝi al ĉiuj samtempe. La ceteraj trovis lian ekzemplon imitinda kaj rapidis sekvi ĝin. Pli malfrue laŭ propono de samideano Thomson (legu Tomson) el Aŭstralio ni cirkuligis inter ni leteron, sendatan sinsekve de unu al alia; ĉiu ricevanto almetas folion, sur kiun li respondas al la donitaj demandoj kaj aldonas siaparte novajn demandojn. Tiamaniere iom post iom, folio post folio, formiĝis tuta rondiranta kajero. En ĝi ni skribas nur pri ĝeneralaj temoj, ĉiu enmetas demandojn laŭ siaj intereso. Pri la aferoj de nia ĉiutaga vivo ni korespondas aparte — ĉu per individuaj, ĉu per cirkuleraĵoj (komunaj) leteroj.

La rondiranta kajero baldaŭ fariĝis spegulo de la individueco de la rondanoj. Oni povas jam ekkoni per ĝi kiu el ni kiajn interesojn havas kaj kiel pensas. Ĝi reguligas ankaŭ niajn karakterojn.

Ekzemple, la brazila samideano Antonio Rodrigues emas pleje al sociaj kaj politikaj temoj; lin interesas la politikaj sistemoj, partioj, regformoj, balotoj. Li demandas pri la heredeco aŭ pri elekto de la ŝtatestroj, pri la sistemo, laŭ kiu oni oficigas aŭ elektas provincestrojn, urbestrojn, vilaĝestrojn k. t. p. En liaj mallongaj energiaj frazoj oni sentas fortan karakteron, logikan penson, persistecon.

La japana samideanino Tanaka estas poeziema, muzikema, sentimentala. Delikata animo, bona koro. Ĉiu el ni, laŭ ŝia deziro, havigis al ŝi notojn de sia nacia himno kaj de popolaj kantoj.

Printempe ŝi skribas pri la florado de la acidĉerizujoj en ŝia malproksima lando, kaj mi skribas pri la dolĉa aromo de la palrozaj floroj de la sovaĝaj rozujoj, kiuj ornamas niajn montojn.

La sudafrika samideanino Evelina havas interesojn pri dommastrumado, kuirarto, ĝardenaj floroj. Al ŝi ĉiu el ni sendis receptojn de specifaj naciaj manĝaĵoj.

Petersen revas pri vojaĝoj en ekzotikaj landoj. Samtempe li interesiĝas ankaŭ pri plej realaj praktikaj demandoj de la ekonomia vivo. En li estas miksitaj romantikeco kaj praktikeco. Li demandas pri la brazilaj praarbaroj, pri la prapatroj de la holandidaj loĝantoj en Sudafriko, pri la malkulturaj gentoj en la sovaĝaj regionoj de Afriko, kaj samtempe pri komercaj rilatoj inter la ŝtatoj, doganaj sistemoj kaj tarifoj, librotenado kaj ne malpli pri diversaj rasoj de dombestoj, pri bovidoj, ŝafidoj, ĉevalidoj, kokidoj. Eble li devis elekti alian profesion: ŝipestro, por traveturi la oceanojn kaj viziti ĉiujn mondpartojn.

Samideano Thomson pruviĝis klera, erudita kaj tre sprita homo. Li ĉiam skribas per delikata humora tono. Li havas plej multflankajn interesojn en ĉiuj

sferoj de la vivo, emon al literaturaj studoj, historio, popolaj moroj. Foje en la rondira kajero li karakterizis mallonge, sed tre trafe kaj humore plene ĉiun el ni. Neniu ofendiĝis. Petersen skribis: „La humoraj notoj de S-ano Thomson estas pravaj; vere ili piketas, sed ne kaŭzas doloron“. — „Jes — alskribis Rodri-gues — ne doloras, tamen jukas. . .“ — kaj Evelina modeste aldonis post li: „Se jukas, ni gratu nin“.

Ni ĉiuj havas unu komunan deziregon: kolektiĝi en universala esperan-tista kongreso, vidi nin persone kaj cementi ankoraŭ pli forte nian amikecon.

SUFIKSOJ

UJ signifas:

- a) **Landon** laŭ la nomo de la indiĝena loĝantaro. Francujo estas la lando de la francoj, la franca lando.
- b) **Objekton**, en kiu oni konservas aŭ portas aliajn objektojn.
monujo — la objekto, en kiu oni portas sian monon.
sukerujo — skatolo en kiu oni havas sukeron.
- c) **Kreskajon** laŭ la nomo de la frukto.
pomujo = pomarbo.
frambujo = framba arbusto.
rozujo = rozarbusto.

Nota. — 1. Pri landnomoj oni povas uzi anstataŭ *uj* la vorton *land*: Franclando, Svislando ktp. Lastatempe oni prefere formas la landnomojn per la internacia finaĵo *io*: Francio, Bulgario.

2. Zamenhof uzis la sufikson *uj* en la kazoj, kiam la nomo de la popolo donas la nomon de la lando; laŭ liaj klarigoj, tio estas la landoj malnovaj, en la „malnova“ mondo. Pri la „novaj“ landoj (laŭ la esprimo de la antaŭa jarcento) la sistemo de nomado de la landoj ne estas farata sur la bazo de la indiĝena loĝantaro, tial oni ne diras Brazilujo, Ĉilujo ktp., sed Brazilo, Ĉilo (nomoj de la landoj) kaj brazilano, ĉilano (nomoj de la respektivaj popoloj). Same Peruo — Peruano, Kanado — Kanadano.

3. En kelkaj kazoj, ĉe kiuj la nomoj de landoj kaj de urboj koincidas, oni diferencigas ilin, uzante la finaĵon *io* por difini la landon: Meksiko (urbo), Meksikio (lando), do: meksikiano (loĝanto indiĝena de la lando), meksikano (loĝanto de la urbo). Same Alĝerio — Alĝero, Tunizio — Tunizo.

ESTR — ĉefo, gvidanto, ordonanto.

urbestro = ĉefo de urbo, vilaĝestro, ŝipestro, lernejestro, ŝtatestro.

Estri = esti ĉefo, gvidi.

Estraro — kolektivo, kiu estras, gvidas.

Estreco — stato de estro. La lernejo estas sub la estreco de la direktoro. Dum lia estreco.

ID — naskito, naskajo.

ĉevalido, bovido, kokido, reĝido, princido, izraelido.

Li estas ido de malnova familio.

Idaro — la homoj, kiuj venas post unu generacio: nova generacio, posteularo

PREFIKSO

- PRA — kiu estis aŭ vivis en tre malproksima pasinteco aŭ kiu estas en parenceco malproksima laŭ tempo.
prahomo, prahistorio, praaŭvo, pranevo, praarbaro, prabulgaro.

EKZERCOJ

1. Ĉu en via tabak. . . estas tabako?
El la sup. . . leviĝis bonodora vaporo.
La ĉeriz. . . donas ĉerizojn, la prun. . . — prunojn.
La angloj loĝas en Angl. . .
2. La urb. . . ordonis, ke oni balau kaj lavu la stratojn.
Nia regiment. . . ne estas kolonelo, sed subkolonelo.
3. La idoj de ŝafo estas. . . kaj de kapro estas. . .
4. En nia lando oni trovis restaĵojn el la . . . historia epoko.

LA PORTETO

(rakonto)

Trarigardante la rimarkindaĵojn de la vilaĝo kun mia konatulo Georgo Mutev, direktoro de la lernejo, mi eniris en la muzeon de la rezistado. Tio estis malgranda ĉambreto apud la sporta salono. De sur la muroj rigardis nin la fotografiaj de herooj, iuj pereintaj, aliaj saviĝintaj. En vitraj kadroj estis ordigitaj eltranĉaĵoj el ĵurnaloj, leteroj, alvokiloj. La direktoro jam kun progresinta aĝo, kun argentumita hararo kaj kornaj okulvitroj, malantaŭ kiuj rigardis saĝaj buntaj okuloj, sciis la biografiojn de ĉiuj herooj, eĉ la plej malgrandajn detalojn, ne nur en kiu dato okazis la plej eta evento, sed ankaŭ en kioma horo, eĉ la minutojn. Ĉe angulo mi haltis embarasita. Pro kio estas ĉi tie la portreto de Kirilo kaj Metodio. Kaj mi ĉirkaŭrigardis ĝin per stranga scivolemo. Ĝi distingiĝis de la konata al mi portreto, kiun oni disvastigis en la pasinteco en la lernejoj—la du fratoj pentritaj kiel sanktuloj, kun malgrasaj ermitaj vizagoj. En tiu ĉi estis io multe pli laika, la vizagoj aspektis vivaj, en la okuloj anstataŭ humileco estis esprimita kuraĝo kaj volo por batalo. Kaj nun Kirilo tenis rulaĵon, sur kiu estis videblaj la komencaj literoj de la Kirila alfabeto, sed lia mano ne estis angela, sed vireca. Faris al mi impreson, ke la papero ĵaloke estis frotdifektita.

— Ĉu en via vilaĝo ankaŭ Kirilo kaj Metodio partoprenis la rezistadon? — ŝercdemandis mi.

— Jes ja! — ridetis Mutev. Tio estas longa historio. Hodiaŭ la homoj laboras sur la kampo, ne estos vizitantoj, ja mi povus rakonti ĉion de la komenco ĝis la fino.

En la antaŭvespero de la dua modmilito mi estigis juna instruisto en tiu ĉi vilaĝo. Nia lernejo troviĝis iom pli malsupre de la nuna—malnova malmasiva konstruaĵo, kun frotdifektitaj muroj, malrektigitaj fenestroj kaj duondetruitaj fumbutoj. Kaj interne — nek lerniloj, nek ia ornamaĵo. Se ni havus almenaŭ portreton de Kirilo kaj Metodio — pensis mi. Kaj mi rememoris pri mia amiko-pentristo. Li ankaŭ estigis instruisto, sed en la alia finrando de nia lando. Mi renkontis lin iufoje kaj mi diris al li: „Ivano, mi havas nenian memoraĵon de vi. Mi nenion deziras de vi krom tio, ke vi por mi alportu la portreton de Kirilo kaj Metodio“. „Konsentite“ — respondis Ivano, ni regalis nin kaj disigis. Ni renkontigis denove post kvin monatoj dum la ferioj. Tiam li donis al mi la portreton. Mi tiel ekĝojis, kiel malmultajn fojojn mi ĝojis dum mia vivo. Mi alportis ĝin kaj pendigis ĝin super la ekstera pordo de la lernejo. Kaj instruistoj, kaj lernantoj haltadis, ĉirkaŭrigardis ĝin kaj kvazaŭ ĝi inspiris al ili pli grandan certecon en la scioj. En la festo ni ornamis ĝin per krono da floroj. La lernantoj elektis la plej densajn kaj klarrugajn peoniojn, alportis de la monto bukajn adonidojn, geranon kaj kion ajn!

En vicoj ni ekmarŝis al la placo meze en la vilaĝo, la du plej bonsukcesaj lernantoj tenis ĝin supre antaŭe. Post tio ni metis ĝin antaŭ la monumenton de la nekonata soldato kaj tie iuj el ni faris paroladon por la granda faro de Kirilo kaj Metodio.

Sed la milito komenciĝis. Kiel alie tiel ankaŭ ĉi tie pasadis hitleristaj ferraŭpoj. Iuj haltis po unu-du tagojn, aliaj foriris. En tiu ĉi tempo la faŝisma potenco malpermesis la festadon de la du fratoj. Oni elpensis, ke nenio kunligas nin kun la slavo, ke ni estas parencaj al la samurajoj. Iuj SS-trupoj restis

tutan semajnon. Mi ankaŭ tiam estis direktoro; mia ĉambro ne estis okupita kaj mi eniris tra la malantaŭa enirejo, por ke mi ne havu kontakton kun la hitleristoj. Ĉiutage venis al mi la lerneja servisto Cvjatko, malriĉa homo, kun multe da infanoj, sindona al sia servo. Li sentis la lernejon kiel sian kaj ĉiam observis, por ke la rabuloj ne forportu ion. Iufoje li klarigis al mi, ke la SS-anoj hakas la benkojn por fajro. Mi intervenis, ni kverelis kun la majoro, sed kion oni povus fari — armita ĝiskape forto. De tiam, mi rimarkis, la suboficiro, kiu okupis loĝejon de miaj dommastroj, renkontis min sur la ŝtuparo kaj ĉiam li minacis al mi:

— Slavo, komunisto, — li siblas per germana-bulgara-rusa lingvo.

Kion mi povus respondi al tiu ĉi porko? Li ofte estis ebria kaj iufoje li frapis ĉu sur la pordon de la dommastroj, ĉu sur la mian kaj li palpis la pistolujon.

Iun matenon mi iras al la lernejo, mi rimarkas ke la portreto de Kirilo kaj Metodio mankas. Io pikis min. Mi konjektis. La vilaĝestro antaŭ du tagoj diris al mi, ke al la SS-anoj ne plaĉis, ke la portreto de Kirilo kaj Metodio pendas super la pordo. Iu doktoro pri historio inter la oficiroj konvinkis la vilaĝestron, ke ni estas neniam slavoj kaj tiun ĉi portreton oni devas forigi. Mi kontraŭdiris — ke en nian historion ne enmiksiĝu fremdaj homoj, ni devas havi nacian dignon. Sed... Mi komprenis, ke la SS-anoj jam venĝis. Kien ili povus forporti ĝin? Post momento venis Cvjatko. Liaj lipharoj nerve movetiĝis, kaj liaj manplatoj pugnigis.

— Mi vidis lin, tiun, la suboficiron, vian kunloĝanton, kiam li malsuprenigis la portreton kaj komencis ŝiri ĝin — balbutis li. Li intencis bruligi ĝin, komencis grati sian fajrilon, sed ĝi versaĵne ne havis benzinon kaj ne bruligis. En tiu momento iu oficiro alvokis lin kaj li forĵetis la portreton al la barilo. Mi prenis la kadron kaj la pecojn kaj forportis ilin hejmen. Mi prenis lian manon kaj ĉirkaŭbrakis lin kiel neniam. Poste mi demandis lin:

— Ĉu ne mankas io?

— Mi ĉion kaŝis — respondis li.

Kaj tuj mi forkuris kun li por vidi en kia stato estis la portreto. Ni trovis gluilon, submetis pli fortan kartonon kaj atente gluis la pecojn unu apud alia. Kiam mi vidis ĝin denove kompleta, regajiĝis mia koro, mi karesis la portreton. Mi emis kisi ĝin, sed mi tuj rememoris, ke SS-ana mano ĝin malpurigis. Mi iom purigis ĝin, ĉu per gumeto, ĉu per lavita naztuko. Realporti ĝin denove en la lernejon estis malprudente — vidinte ĝin oni neniigus ĝin. Se mi ĝin konservus en mia ĉambro — la suboficiro eble enrigardos iun fojon kaj kiu scias kion li faros. Pro tio ni decidis kun Cvjatko kaŝi ĝin en lian pajlon.

La novaĵo disvastiĝis kiel fulmo tra la vilaĝo. Eĉ iuj pli riĉaj vilaĝanoj indignis pro la agmaniero de la SS-anoj. Des pli la junularo, la malriĉuloj kaj la mezriĉaj homoj.

Kompreneble, ni kun Cvjatko diris al neniuj ke ni gluis la pecojn kaj ke ni kaŝis la portreton. Kaj jen iun vesperon mia kunloĝanto ne revenis. En la mateno la SS-anoj hirtiĝis kiel panteroj. Gardokupis la elirajn vojojn kaj anoncis blokadon. Ili komencis aresti tutajn familiojn kaj kondukis ilin al pride-mando. Iuj fluŝtritis, ke ili intencas bruligi la vilaĝon. Sed ni havis bonŝancon — alvenis ordono eltiriĝi tuj. La SS-a suboficiro estis malkaŝita post longa tempo en la kavo, kien la vilaĝanoj forĵetis la mortintajn pro infekta malsano bestojn.

Tuj kiam ili foriris ni kun Cvjatko pendigis la portreton sur la antaŭa

loko. Ni invitis la vilaĝanojn al gepatra-instruista renkontiĝo. Antaŭ eniri internen ili fiksis rigardon en ĝin. Iuj premis ĝoje la manojn, la kompatemaj avinoj kruccignis, riverencis kun eklarmitaj okuloj.

Iun tagon post la fino de lernhoroj, la lernantoj lasis en la ĉambro nestingitan fornon malfermita. Proksime estis la korbedo kun paperetoj. Falis karbadaĵo kaj flamoj komencis eliri zigzage. Estis antaŭvespere. Mi aŭdis kiel alarme sonis la sonorileto.

— Brulego, la lernejo brulas! — kriegis iu.

Mi forkuris tuj, sed Cvjatko antaŭigis min. Li kriis:

— La portreton, la portreton prenu, jen estas, mi dekretois ĝin . . .

Venis junaj kaj maljunaj kaj la brulego estis estingita.

Post la liberiĝo la unua tasko estis konstrui novan lernejon. Sur la loko, kie estis la malnova lernejo, ni faris ĝardenon. Kiam ni aranĝis la muzeon de la rezistado, ni decidis ke tiu ĉi portreto de Kirilo kaj Metodio devas okupi indan lokon. Ni decidis okaze de la milcenta datreveno de la du fratoj ni manifestu tra la stratoj kun ĝi. La portreto albatis tion . . .

Tradukis: **Ivan Draganov**

BULGARAJ POPOLKANTOJ

AMO

Al D . .

Malsaniĝis Jana belulino,

vnusola de patrino filino.

Ŝi mallaŭte al patrino parolas:

— Ne kolektu, panjo, vi drogherbojn,

ensekigu la ebenan kampon,

ĉar pro mi ebena kampo ploras.

Fajro, panjo, brulas, ne finbrulas,

amo, panjo, ardas, ne finardas,

amon, panjo, drog' ne resanigas,

akvo, panjo, ĝin ja ne estingas.

2

Se vi volas rosan floron,

venu, petolul', matene —

dum maten' la floro estas

ĉiam freŝa, ĉiam gaja!

Se vi malvarmetan akvon

volas, venu vi tagmeze —

tiam, petolulo, akvo

estas malvarmeta, freŝa!

Se vi volas karesadon,

venu, petolul', vespere —

al la junulin' vespere

estas kara karesado.

El la bulgara tradukis:

Vasil Slavov

РЕП приема абонати за второто полугодие. Не изпускайте срока 20 юни. Абонирайте всички нови есперантисти. Абонаменти приемат всички пощенски станции в страната.

Mi tenis vian manon,
samkiel etinfano
paseron tenas treme
kaptinta ĝin kun peno.

Kunesto kaj silento. . .

Konsolas nur la vento

orflavan foliaron

en dolĉo kaj amaro.

Mi tenas vian manon

kun fido de infano,

kaj unu post alia

surŝutas nin folioj.

Nikola Pilev

Varna

ЛЕТУВАНЕ В ДРУЖЕВО

Тази година в учебния лагер „Есперанто“ в с. Дружево ще има четири смени по 15 дни. Те започват съответно на 28 юни, 15 юли, 1 август, 17 август.

Битовите условия са значително подобрени. Обзаведени са две спални помещения. Летовниците ще трябва да си носят кърпи за лице, чаршаф и одеало.

Записването става с изпращане на вноската от 25 лева не по-късно от 10 дни преди започване на смяната. Сумите да се изпращат на Българска есперантска кооперация, с/ка 113/601, БНБ — 1/104 — София. Заявките ще се приемат до попълване на смените.



LA PLEJ GRANDA URBO DE AFRIKO

Apenaŭ ni komencis la vojaĝon tra Afriko, kaj jam ni troviĝas en la plej granda urbo de tiu kontinento. Multaj el miaj legantoj sendube jam scias pri kiu urbo temas. Kaj al tiuj, kiuj ne povas diveni, mi diros. Temas pri Kairo. Kun siaj tri milionoj da loĝantoj Kairo, la ĉefurbo de Unuiginta Araba Respubliko, estas ne nur la plej granda urbo de Afriko, sed ankaŭ unu el la plej grandaj urboj de la mondo.

Sed se vi pasas tra la stratoj de iu urbo, aŭ staras antaŭ iu konstruaĵo, aŭ rigardas kiel la homoj komercas sur la vendoplaco, vi ne vidas la grandecon de la urbo. Multe pli facile vi rimarkos aliajn vidindaĵojn. Ĉiu urbo havas iujn karakterizajn trajtojn per kiuj ĝi diferencas de aliaj urboj.

Kiel vi fartus se vi vekigus iun matenon en iu urbo, en kiu vi neniam estis antaŭe? Vi ne povas rememori kiel vi venis tien. Kompreneble, vi povus eliri al la strato kaj demandi iun kiel nomiĝas tiu urbo. Sed verdire vi fariĝus ridinda. Kaj povus okazi, ke la homo kiun vi demandis, nur kun miro rigardus vin, ne komprenante eĉ vorton el via demando. Kion tiam? Prefere vi mem observu la surskribojn sur la strato, la vestaĵojn de la homoj, kaj aŭskultu la diversajn urbajn sonojn.

Guste tion min vekis en Kairo dum mia unua mateno. Voĉo al mi konata, sed kiun mi jam longe ne aŭdis. La muezino de sur la minareto de iu moskeo vokis la mahometanojn al preĝo. Kaj se mi momente estus forgesinta kie mi troviĝas, tuj estus al mi klare ke mi kuŝas en urbo en kiu almenaŭ parto de la loĝantaro apartenas al Islamo. En ĉiuj tiuj urboj kvin foje dum la tago, ekde frumateno ĝis vespero, tuj kiam tiu voko aŭdiĝas, ĉiuj mahometanoj, kie ajn ili troviĝas: hejme, en la vendejo aŭ survoje, rapide serĉas fluantan akvon en kiu ili lavas la manojn, vizaĝon kaj piedojn, por tiel purigitaj komenci la preĝadon. Dum preĝado ili estas sur genuoj, kliniĝadas ĝis la tero, tuŝante per la frunto la tapiŝon aŭ maton kiu kovras la plankon.

Kiam mi ekrigardis tra la fenestro, mi surpriziĝis ne povante vidi la muezinon (iuspecan pastron), kies voĉon mi estis aŭdanta. Sur la ronda balkono de la alta minareto, tiu cilindroforma turo, troviĝis nur laŭtparolilo. Mi rememoris ke en multaj urboj oni vokas al preĝado laŭ moderna maniero, per mikrofono.

Kiam mi eliris sur la straton, tuj frapis miajn okulojn ke la plimulto de la homoj estas blanke vestita. Do, evidente mi troviĝis en iu regiono kun varma klimato. Sed ne nur tio. La plimulto de la viroj ne portas pantalonon, sed kvazaŭ iun longan dormĉemizon, preskaŭ ĝis la planko. Tiu vestaĵo nomiĝas „galabia“ kaj estas tre praktika, ĉar ne premas la korpon en varmaj tagoj. Sur la kapo la plimulto portas blankan turbanon. Sed multaj viroj, precipe la junaj, estas vestitaj same kiel ĉe ni aŭ en aliaj eŭropaj urboj.

La pli junaj virinoj estas vestitaj laŭ la moderna modo, dum la pli aĝaj kiuj sekvas la kutimojn de sia lando, estas vestitaj plejparte en mantelo el malpeza nigra teksaĵo, kiu kovras iliajn kapojn kaj kelkfoje ankaŭ parton de la vizaĝo, ke nur la okuloj estas videblaj.

Troviĝante sur la strato, mi komencis observadi la straton mem. Iuj en la urbocentro estis largaj, puraj kaj tre bele ordigitaj kiel veraj avenuoj aŭ pro-

menejoj. Tie estis konstruaĵoj ankaŭ de antikva tipo kun bela orienteca arkitekturo, aliaj estis modernaj kun dek aŭ pli da etaĝoj. Mi havis la impreson ke mi promenas tra grandurbo kun multaj belegaj vendejoj.

Iom pli fore de la urbocentro estas multaj malpli grandaj kaj malnovaj domoj, kun butikoj, antaŭ kiuj sidis homoj, trinketis kafon kaj fumis cigaredojn aŭ nargileojn. Nargileo estas, kiel vi jam scias, ronda akvujo el kiu eliras longa fleksebla tubo. Kiam oni fumas, la fumo unue trapasas la akvon kaj tiel filtriĝas antaŭ ol alveni en la buŝon.

Ĉi tie estas granda trafiko, kvankam ne estas tiom da aŭtomobiloj kaj aliaj motortrafikiloj kiel en la urbocentro. La legomvendistoj sur puŝĉaretoj disportadas fruktojn, legomojn kaj aliajn varojn, kiujn ili laŭte proponadas. La glaciaĵisto sonorigas, la arakidvendisto fajfas por altiri la atenton.

En tiu parto de la urbo mi vidis moskeon, veran majstroverkon de konstruarto, konstruitan antaŭ pli ol mil jaroj. Proksime al ĝi troviĝas fortikaĵo sur iu altaĵo. Ĝi estas nomata „citadelo“, kaj oni diras ke ĝi estas la plej malnova konstruaĵo en Kairo.

Sed se vi deziras havi ĉarman superrigardon al Kairo, grimpu per lifto sur la „Kairan turon“, altan 180 metrojn. Mi faris tion vespere. Mi havis la impreson ke antaŭ miaj okuloj estas disŝutita plena korbo kun miloj da brilaj steletoj.

Tibor Seketj

TRA LA GAZETARO

En ĵurnalo „**Naroden drugar**“ — Jambol (12. III.) — artikolo de K. Georgiev, membro de la kabineto „Juna korespondanto“, kun titolo „Esperanto-amikeco-paco!“

En ĵurnalo „**Septemvrijsko zname**“ — Pazarĝik (20. III.) artikolo de K. Genčev „Aktiva agado de la esperantistoj en Pazarĝik“.

En ĵurnalo „**Stopanoved**“ — Varna (21. III.) — artikolo de Nikola Pilev, prezidanto de E-grupo „Studenta amikeco“. „Esperanto-lirĝvo de ĉiuj homoj“, kaj kelkaj humorajoj de G. D. (Georgi Dimov).

En la sama ĵurnalo (5. IV.) oni sciigas ke la ĝisnuna supera instruanto ĉe la Supera Instituto por Nacia Ekonomio Georgi Dimov prezidanto de E-societo „Albatro“, estas konfirmita de la Supera Atesta Komisiono kiel docento. Niajn gratulojn!

En ĵurnalo „**Trud**“ — Sofio (2. IV.) — artikolo „La unua fakultato de Esperanto en la lando“ — oni rakontas pri la Esperanto-fakultato ĉe la Kultura domo de la sindikatoj en Pazarĝik.

Al niaj kamaradoj en Pazarĝik ni deziras plenan sukceson.

En ĵurnalo „**Narodno delo**“ — Varna (10. IV.) — artikolo de Ljuckan Dobrev „Rememoroj de la koncentrejo“ Krăsto Pole“, en kiu la aŭtoro rakontas ke en la koncentrejo oni lernis Esperanton.

En ĵurnalo „**Dunavska pravda**“, Ruse (17. IV.) — artikolo de J. Kalinov — „Studenta esperantista societo“, en kiu la aŭtoro rakontas ke je la 12-a de aprilo oni fondis studentan esperantistan societon „Danuba studento“ ĉe la Supera instituto por elektrizado de la vilaĝa (agrikultura) mastrumo.

SOFIA URBA KOMITATO

Je la 25-a de aprilo kuranta jaro estis elektita urba komitato de la sofiaj esperantistaj societoj en konsisto: prezidanto N. Nanov (s-to „M. Gorkij“), sekretario Vera Nikolova (poŝtista E-societo „Heroldo“) kaj reprezentantoj de la apartaj societoj: Dinjo Stankovski, Trifon Maĝarov, Petăr Lilkov, Kiril Ĥristov, Dimităr Popov, Emil Keremidčiev, Julij Penkov, Ljuben Grozdanov, Milka Kostadinova, Petăr Dimitrov, D'imităr Giŝanov, Dimo Kolev, Nikola Jeljazkov.

LA DECIDOJ PLENUMATAJ

Jambol. La estraro de la esperantista societo trarigardis kaj pridiskutis en sia kunsido la rezolucion de la dua plenkunsido de la Centra Komitato de Bulgara Esperantista Asocio de 15-a de decembro 1963. Ĝi decidis helpi al la esperantista societo „Amikeco“ en vilaĝo Zimnica.

La 17-an de marto grupo da geesperantistoj el Jambol, inter kiuj D. Trudoljubov, G. Jordanov, D. Razmonaj, S. Angelov, J. Dimitrov, Krasimira Dojnova, K. Georgiev kaj aliaj vizitis vilaĝon Zimnica. Tie okazis renkonto inter esperantistoj el Zimnica kaj Jambol, en kiu oni pridiskutis demandojn rilate al la agado de la du societoj — plimultigo de la societaj membroj, la abonantoj de revuo „Bulgara Esperantisto“, organizo de karavano por la junulara festivalo en Varna, por la 19-a Tutmonda Junulara Esperanto-Kongreso en Vraca kaj por la 48-a Universala Kongreso de Esperanto en Sofio, arango de kunaj ekskursoj ktp.

La esperantistoj vizitis la geedzigon de Marinka Koleva, kasistino de la esperantista societo en Zimnica, kie kamarado David Hazmonaj en la nomo de la esperantistoj el Jambol kaj Zimnica gratulis la junan edzinon kaj donis belan donacon. La esperantistoj faris foton kun la junaj geedzoj. Ili faris bonan propagandon de Esperanto kaj de la bulgara esperantista movado.

Krasimira Dojnova

Vilaĝo Belovo, Pazargika distrikto.

La 1-an de aprilo en la politeknika lernejo oni malfermis E-kurson kun 15 gepartoprenantoj-instruistoj. Kursgvidanto estas Veska Duneva.

KARAJ GASTOJ DE „BALKANA KONKORDO“

Vil. Satrovo. Rapide diskonigis la novaĝo pri la vizito de samideanoj G. Pompilio, konstanta kongresa sekretario ĉe UEA, kaj V. Oljanov, sekretario de BEA, en v. Satrovo. Je la horo de ilia alveno la vilaĝa placo estas plenkuna je gevilaĝanoj. La aŭtomobilo alvenas kaj haltas meze de la publiko. La prezidanto de la societo kamarado G. Kaŝukeev salutas la gastojn kaj prezentas ilin al la respondecaj personoj de la vilaĝo. La esperantistinoj Ivanka Ilieva kaj Atanaska Slaveva, en naciaj kostumoj, laŭ bulgara kutimo proponas panon kaj salon al la gastoj kaj salutas ilin esperantlingve.



La sekvintan tagon je la 10-a horo en la Esperanta klubejo okazis la unua jarkunveno de societo „Balkana konkordo“. Post la raporto de la prezidanto parolis sinjoro Pompilio, kiu interalie diris: „Ni parolu la lingvon, kiu apartenas al neniu nacio, por ke ni sentu nin egalaj inter ni!“

Kamarado Oljanov ankaŭ salutis nian unuan jarkunvenon je la nomo de CK de BEA.

Por niaj geesperantistoj kaj niaj gevilaĝanoj ĉi tiu okazo restos neforgesebla.

Ivan Filov

SMOLJAN Okaze de la 48-a Universala Kongreso de Esperanto en Sofio kaj la decido de la akademia konsilantaro de Sofia Ŝtata Universitato pri enkonduko de Esperanto kiel fakultativa lernobjekto, en la Pedagogia instituto de Smoljan estis farita prelego je temo: „Esperanto servas al la progreso kaj la paco“. Pluraj ĉeestantaj gestudentoj post la prelego esprimis deziron lerni Esperanton.

La kurso laŭ la rekta metodo komenciĝis la 25-an de februaro kun 40 gestudentoj.

P. Pamporov

EN KÂRGALI, ĤASKOVO KAJ PLOVDIV

Dum la dua duono de marto la vicprezidanto de BEA k-do Atanas Lakov vizitis la urbojn Kârgali, Ĥaskovo kaj Plovdiv. Tie li renkontiĝis kun la estraroj de la lokaj Esperanto-societoj kaj pritraktis kun ili organizajn, kulturklerigajn kaj aliajn demandojn. Li informis la estraranojn kaj la esperantistojn pri la stato de la preparlaboroj por la 48-a Universala Kongreso de Esperanto.

En Ĥaskovo dum ĝenerala kunveno de la esperantistoj k-do Lakov prelegis pri la Esperanta poezio kaj en Plovdiv — pri la internacia lingvo kaj la leninismo. Post la prelegoj okazis viglaj diskutoj, en kiuj partoprenis multe da lokaj esperantistoj.

RUSE. La 3-an de marto, dimanĉe, je la 9-a horo okazis la jarkunveno de urba societo „Libero“ en la legejo „Zora“, kiu afable disponigis sian salondon. Ĉeestis kiel gastoj: la reprezentanto de urba komitato de BKP k-do Ganco Ivanov kaj prezidanto de fervojista societo „Ponto de la Amikeco“.

Bonegan raporton pri la agado dum 1962 jaro legis la sekretario k-dino Preslavska.

Sub la signo de l' okazonta 48-a UK en Sofio dum la kuranta jaro — la societanoj parolis zorgoplene pri la plibonigo de la lingva nivelo, pri aranĝo de la renkonto kaj akcepto de l' traveturontaj kongresanoj dum la somero.

La reprezentanto de BKP k-do Ivanov parolis pri la seriozaj taskoj de la esperantistoj en Ruse kaj informis la ĉeestantojn pri lia zorgo kaj peno havigi al ni pli grandan klubojon en la centro de la urbo.

La 10-an de marto granda grupo el nia societo vizitis vilaĝon Ŝtrâklevo, kie la tiea Esperanto-societo festis sian 5-jaran datrevenon kaj ŝanĝis la nomon de la societo je la nomo de pe-reinta antifaŝisto Petâr Kirjakov. Ĉe konvena ceremonio estis subskribita kontrakto inter niaj societoj por kunlaboro kaj patroneco de societo „Libero“ el Ruse al la societo en Ŝtrâklevo.

Boris Kavalĝiev

SOFIO. Dum marto en Sofio denove ĉeestis s-ro G. G. Pompilio — KKS lige kun la antaŭpreparoj por la 48-a UK. En kunveno de societo „Maksim Gorkij“ li detale rakontis pri sia vojaĝo kaj pluraj kontaktoj kaj prelegoj en kelkaj okcidentaj landoj. Li aparte substrekis ke rakontante faktojn pri la gastameco de la bulgara popolo, kiun li persone spertis, li povis konvinki plurajn hezitemajn samideanojn viziti la Universalan Kongreson en Sofio.

Li same raportis pri la tute kontentiga stato de la ĝisnuna aliĝado kiu superas ĉiujn antaŭajn kongresojn je la sama periodo.

Iv. Draganov

PAZARĜIK. Dum februaro okazis la jarkunveno de la loka societo „Radio“, kiun ĉeestis pli ol 90 gesocietanoj, precipe junuloj kaj ankaŭ reprezentanto de CK de BEA — k-do C. Murgin kaj de societoj en Plovdiv, Peŝtera kaj Velingrad. Ĉeestis ankaŭ k-dino Belčeva el la urba komitato de BKP kaj k-dino N. Markova el la sindikatoj.

Pri la societa agado raportis k-do P. Arnauĉov. Menciinde estas, ke ĉe la Popola Universitato, funkcia en la Sindikata Domo, estas malfermita Esperanto-fakultato. Ĝin partoprenas 15 geesperantistoj por tiel perfektigi sub la gvidado de spertaj lektoroj.

K-doj Kukuŝev kaj Viŝegonov parolis pri la agado inter la junularo. M. Kolčakova el Velingrad proponis renkonton inter la societoj. C. Murgin emfazis la rolon de nia lingvo en la pachtato. La kunveno elektis novan estraron kun prezidanto Nikola Ĉarcarov, sekretario — Petko Arnauĉov kaj prezidanto de la junulara grupo — Iv. Piličev.

BRAVE AL LA VELINGRADAJ ESPERANTISTOJ!

La estraro de la esperantista societo „St. Kalpazanov“ en u. Velingrad instigis la societanojn kontribui al la fonduso „Montodomo Esperanto“. Dek tri personoj donacis 53.50 levojn. Nome:

N. Godev — 25, Iv. M. Ĉolev — 5, M. Kolčakova — 5, V. Petrova — 3, I. Kolev — 2.50, I. Bonev — 2, P. Kotev — 2, M. Malčeva — 2, M. Pipeva — 2, V. Pineva — 2, R. Milanova — 2, G. Jolov — 1.

Brave, gesamideanoj! Via helpo estas ĝustatempa kaj necesega. Via ago certe instigos ankaŭ la estrarojn de la societoj en la urboj Plovdiv, Ruse, Burgas, Pleven, Vraca kaj en aliaj loĝlokoj baldaŭ raportii kion ili faras por certigi la finkonstruon de la montodomo antaŭ la komenco de la 48-a UK

Nikola Godev el Velingrad estas nomita fondinto de la montodomo.

Surprizu agrable vian eksterlandan amikon enskribante lin en la listo de la donacintoj por la montodomo.

Turista sekcio „Esperanto“
Poŝtkesto 44, Sofio

PREFERE AKTIVA NUN, OL RADIKTIVA MORGAAŬ. . .

Miloj da gejunuloj, studentoj kaj civitanoj demonstris la 24-an de marto ĉi-jare en Bruselo (Belgio) sian viglan kontraŭstaron al la terura minaco de la atomarmado. Kvankam politike kaj religie diversopiniantaj, ili plenkonsciis pri la komuna danĝero kompromitanta ilian estontecon laŭ skalo nekonata en la homa historio.

Impona manifestacio, plena je juneca ardo kaj entuziasmo, dum horoj trairis la urban centron por finiĝi per mitingo kie paroladis la senatoroj H. Rolin kaj K. van Cauwelaert same kiel kvar delegitoj de la organizintaj junularmovadoj.

Ĉekape de la manifestacio marŝis japanoj el Hiroŝimo kaj poste eksterlandaj junulargrupoj, ĉefe germanoj, angloj, nederlandanoj kaj francoj, dominante tiel al la evento ĝian internacian karakteron.

Inter la ĉefaj sloganoj elstaris: „Neniaj kernarmiloj en Belgio nek por la Belga armeo!“ „Tujan ĉesigon de la atomeksplodoj!“ „Haltigu la pluan atomarmilan disvastigon! Detruadon de ĉiuj atomarmiloj.“ „Kompletan, samtempan kaj kontrolitan senarmadon!“

Rimarkinda estis la kompleza sinteno de la popola publiko, kiu plurloke spontane plifortigis la vicojn de la manifestantoj aŭ laŭte demonstris sian simpatian.

Kio estis la gvidmotivo de la organizintoj? Jene oni povas ĝin resumi: se malgrandaj homamasoj apenaŭ kapablas influi la grandpotencojn, ili tamen kapablas influi la enlandan parlamenton kaj registaron pere de la publika opinio. Krome, se la popola



volo de eta lando, kiel Belgio, estus sukcesinta malhelpi sian registaron partopreni la frenezan sinarmadon rekte kondukantan al la atommorto, tia sukceso estus valora instigilo por alilandaj pacmovadoj, kiuj la samon povus postuli de sia propra registaro.

La oficialuloj — kiel kutime — malagnoskis tiun porpacan manifestacion. Tamen menciindas, ke multaj eminentuloj el pluraj politikaj, sindikataj kaj religiaj rondoj publike ĝin aprobis kaj kunlaboris al ĝia efektivigo kaj diskonigo. Esperiga signo pruvanta ke la nombro de homoj, konsciaj pri la mondskala danĝero, daŭre kreskadas kaj ekkomprenas ke nur amasa reago povas devigi la registarojn reipensii la mondpolitikon laŭ pacaj principoj.

Belga Pacbatolanto

La 4-an de aprilo 1963 en Ruse forpasis la eksvicprezidanto de la esperantista societo „Libero“, longjara instruisto kaj direktoro

Petr Tončev Ivanov.

Niajn kondolencojn al la funebranta familio.

Ĉefredakto o: Violin OLJANOV

Redakta komitato: Kiril DRAĴEV, Atanas LAKOV, Canko MURGIN (vicĉef daktoro)
Ivan SARAFOV, Simeon SIMEONOV.

Korektis: V. Petrova

Adreso de la redakcio:

Sofio, poŝtkesto 66.

Tel 3-26-82

DEZIRAS KORESPONDI

SOVETUNIO

Valerij Durnovcev (18-jara studento, historiisto), Stromynka 32, kv. 515. Moskva B — kun ĉi pri historio moderna muziko kaj pentraĵo.

L. M. Andreeva, str. Darnaja 1, Kislovodsk 48 — fraŭlino, kun medicinistoj-fraŭloj.

Svetlana Kalašnikova (18-jara studentino) saj Ivan Lisiĉnij (25-jara fraŭlo) — kun ĉi pri literaturo, muziko, fremdlingvoj, politiko, pacmovado, turismo; interŝanĝas PM, PK, E-ajojn, aliajn objektojn k. a. Urbo Krivoj rog — 26, Do vostrebovanija.

E-rondeto „Flamo“, Redakcio „Sovjeta konstruistoj“, Krivoj Rog-26, Ukrainio — kun ĉi pri ĉt.

Domo de la pioniroj, Rostov—Don — kun ĉi pri ĉt.

Grinblat Abram, str. Teatralnaja 4, kv. 2, Kiŝinev — Centr, Moldavio — PM, PK.

Vebeliunas Albinas, Kaunas 6, Litovio — sendos litovan longdaŭran E-sondiskon, plenumitan de rava tenorvoĉo de Virgilijus Noreika kontraŭ jarabono de „Nuntempa Bulgario“.

ĈEHOSLOVAKIO

Karel Cervenka, LMS, Vimperk — 16—19-jaraj gelernantoj — kun ĉi.

RUMANIO

Fraŭlino Lupea Elisabeta, str. Piata Grivita 1, Sibiu — pri geografio, turismo, historio, E-movado.

Opreanu Serban, str. Stefan Furtuna 110, Raion 16 Februarie, Bucuresti 12 — Interŝ. PM (novaj) kun filatelistoj el Bulgario, Hungario kaj Ĉeĥoslovakio.

FRANCIO

Johano Villard, „Esperanta gastejo“, Jainzac (Chareute) — pri floroj, arboj, abeloj kun bulgaroj.

HUNGARIO

S-ro Francisko Dujmov, str. Poch N. № 26, Baja — kun bulgaroj.

POLLANDO

Zbigniew Stepień, Szczecin, ul. Piastów 58 m 12 — PM, pri filmoj.

Wojciech Lehmann, Bydgoszcz, Niemcewicz 5/23 — kun gejunuloj.

Zrnderowska Zofia, Myskow, ul. Jedwabna 45, woj. Katowice — pri filmo, muziko.

Leszek Jakubowski, Bydgoszcz, ul. Marcinkowskiego 6/8 — kun gejunuloj.

Anzelm Debicki, Zielona Góra, Plac Stowianski 6 — pri poŝtkarto, esperantaj revuoj, fotoj de kinoaktoroj.

Marek Zurowski (17-jara), ul. Rycerska 6, m. 1, Bydgoszcz — kun knabo aŭ knabino el Bulgario; Pl, PM, alumetaĵ etiketoj.

Kucharski Czesław, ul. Mostowa 24, Pomorze, Brodnica.

Agnieszka Krike, ul. Lazienna 15, Pomorze, Brdnica.

Roman Mazurkiewicz, Zielona Góra, ul. Haterów Westerplatte 9 (W. Z. S. P.) — pri turismo.

Andrzej Krawczyk, Kozienice, Lubelska 44, Woj. Kielce — PK, PM.

BULGARIO

Spas Popov, Benkovska 80, Pazarĝik, interŝanĝas librojn, revuojn, PK kaj PM kontraŭ meblaj kaj arkitekturaj revuoj aŭ katalogoj el Germanio (Orienta), Italio, Usono kaj Brazilo.

Georgi Atanasov, vilaĝo Banja, distrikto Pazarĝik.

La Urba komitato de la pacbatalantoj en urbo Svilengrad deziras kunligi kun la lokaj komitatoj de la pacbatalantoj el ĉiuj landoj de la mondo.

Pionira E-rondeto, učilište „V. Levski“, Loveĉ — kolektive kaj individue kun ĉi pri ĉt.

15—16-jaraj gelernantoj el vilaĝo Zimnica, distrikto Jambol per Spas Kănev Ivanov — kun geamikoj el ĉi pri ĉt.

Esperanto-societo „Eterna amikeco“ en Pleven aranĝos grandan ekspozicion okaze de la 60-a datreveno de sia fondiĝo kaj la 48-a UK. Ni petas esperantistojn montrantaj la evoluon de la enlanda Esperanto-movado kaj la ligojn de esperantistoj el nia urbo kun la enlandaj Esperanto-societoj nun kaj en la pasinteco. Estas nkaŭ petataj sugestoj pri la aranĝo, PK, bonleziroj kaj aliaj materialoj el via diversflanka agalo. Valoraj objektoj estas resendebaj. Geamikoj, tuj sendu la materialojn je adreso: Pleven, str. Petăr Beron 6, Zdravko Velikov.

PRI LA REGIONAJ KONFERENCIOJ

Iuj societoj aranĝas distriktajn kaj regionajn konferenciojn sen la scio kaj la aprobo de CK de BEA. Ni atentigas, ke tio estas grava rompo de la asocia disciplino. Regionajn kaj distriktajn konferenciojn oni povas kunvoki nur post la aprobo de CK. Tio nur favorus la bonan aranĝon de la konferencoj kaj la kontentigan rezulton. La separemaj agoj de la societoj, kiuj evitas la kunlaboron kun CK, povus fuŝi la aferon kaj kompromiti la bonan iniciaton por kunvoko de regionaj konferencoj.